



ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais & Picardie

PROTOKOLO DE KUNSIDO DE LA FEDERACIA KOMITATO

Dato : 18 OKT 2009

Horaro : 10^a00 ĝis 13^a30 (3 h 30 min)

Loko : Lille (59) – Maison régionale de l'environnement et des solidarités, strato *Gosselet*

Tagordo :

1. Membrara kaj financa statoj
2. Lokaj kursoj kaj ekzamensesio
3. Eŭropa Rendevuo de Morbecque : Rendevuo 2009, estonta organizado
4. Interfederacia kongreso en 2010
5. Tombo de Eugène Grosjean-Maupin
6. Tutlandaj, interasociaj klopodoj : peticio, komuna renkontiĝo, ktp.
7. Eventualeco de universala kongreso en Francio
8. Federacia prezidanteco
9. Diversaĵoj : renovigota komitato de la kultura centro Grésillon

Kunvokitoj :

		Ĉeestis	Senkulpigis	Ne ĉeestis
— Xavier Dewidehem, prezidanto (LIL)	XD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— France Valet, vicprezidanto (LIL)	FV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Catherine Boen, sekretario (LIL)	CB	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Xavier Vilain, kasisto (DUN).....	XV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Jeanne Bigand (BOU)	JB	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Michel Dechy (LIL)	MD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Jean Dietrich (VAL)	JD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Maryse Findinier (BOU)	MF	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Françoise Gaillard (ARR).....	FG	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Bruno Hermand (BOU).....	BH	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Marie-Jeanne Liné (BOU)	MJL	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Claude Longue-Épée (LIL).....	CLÉ	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Arlette Plutniak (ARR).....	AP	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Jacky Ramon (ARR).....	JR	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
— Richard Valet (LIL) <i>rajtigis France Valet</i>	RV	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>

Sume, 11 komitatanoj ĉeestas (10) aŭ estas reprezentataj (1) : la kvorumo estas atingita.

N.B. : La reprezentataj komitatanoj estas signitaj per kursivo en la voĉdonrezultoj.

1. MEMBRARA KAJ FINANCA STATOJ

Informoj : XV disdonas dokumentojn, kiuj resumas la membraran kaj financon statojn de la Federacio.

1. El la ĉekkonto kaj ŝparkonto la Federacio disponas nun pri 21 496 €. Male de la pasinta jaro, la nuna jaro estas karakterizita de enspezo pli multa ol la elspezo.
2. En 2009 la Federacio enkalkulas 116 membrojn : 23 el la klubo Arras, 0 el la klubo Boulogne, 19 el la klubo Dunkerque, 32 el la klubo Lille-Villeneuve-d'Ascq, 22 el la klubo Valenciennes kaj 20 individuoj-membroj. La membraro pintis en 2006 post « Boulogne 2005 », kaj de post tiam ĝi malkreskas. La pikarda proporcio restas bedaŭrinde tre malalta. XD maltrankviliĝas pro la membraro en la klubo Boulogne.
3. JR proponas ĝiri almenaŭ duonon de la ĉekkonta mono al dua ŝparkonto. XV ekzamenos tion.
4. Estas interkonsente konfirmite, ke la Federacio monkontribuu aparte pri lerniloj kaj publikaj informiloj. Tio estu memorigata al la membraj asocioj per la federacia revuo *Norda Gazeto*.

Decido :

La Federacio centprocente repagos al la membraj asocioj lernilojn kaj de UFE eldonitajn publikajn informilojn post petoj iliaj, laŭ komunikotaj fakturoj kaj ĝis la sumo de iliaj respektivaj monkontribuoj en la aktuala kontjaro.

Poras : CB, MD, XD, JD, CLÉ, FG, AP, JR, FV, RV (11)

Sindetenas : XV (1)

Kontraŭas : — (0)

2. LOKAJ KURSOJ KAJ EKZAMENSESIO

Informoj : **1. Kursoj.** En Arras estas du gradoj kaj ĉ. 20 lernantoj. En Dunkerque estas du gradoj kaj ĉ. 6 lernantoj. En Villeneuve-d'Ascq estas du gradoj kaj 14 lernantoj ; en Bersée 5 lernantoj ; en Oignies 7 lernantoj. En Valenciennes estas 4 lernantoj por duagrada kurso.

2. Ekzamensesio 2009. CLÉ indikas, ke 10 homoj ekzameniĝis en junio 2009 en Lille. Ili venis nur de Arras kaj Lille, kaj trapasis nur la unuan aŭ la duan gradon. XD taskas CLÉ kaj CB por rezervi daton kaj MRES por la venontjara ekzamensesio.

3. Triagrada ekzameno. AP informas, ke ĉi-jare en Arras stariĝos lerngrupo por preparo al la triagrada ekzameno ; sed por tio necesos kompetentaj homoj, ekz. ^{sinoj} Jausions kaj Triolle. CLÉ kaj XD apogas tian klopodon.

4. Staĝo « Artoŝoko ». AP memorigas, ke la Federacio monhelpis la organizon de tiu staĝo. Ĉi tiu estis vere bonega kaj ĝuis la altan kompetenton de Katalin Kováts.

5. Edukado.net. AP indikas, ke la fondaĵo Edukado.net kolektis sufiĉe da mono por vivteni. Sed plu necesas mono por plifortigi tiun staton kaj certigi la planatan evoluon de la retejo. AP proponas, ke la Federacio monhelpu al Edukado.net.

Decido :

La Federacio monhelpos la fondaĵon Edukado.net je 500,00 € en 2009, kun decideblaj monhelpoj en venontaj jaroj.

Poras : CB, MD, XD, JD, CLÉ, FG, AP, JR, FV, RV, XV (11)

Sindetenas : — (0)

Kontraŭas : — (0)

3. EŬROPA RENDEVUO DE MORBECQUE (ERM)

Informoj : **1. Eŭropa Rendevuo en 2009.** FV informas, ke ĉio estas en ordo. Ĉi-jare mez-oktobre jam alvenis pli multaj aliĝiloj (49), ol en la pasintaj jaroj.

2. Estonta organizado. FV kaj RV deziras ne plu zorgi pri ERM. Tiun organizadon ŝi vere tre ŝatis malgraŭ regula malkvieteco. XD gratulas kaj tre dankas al FV kaj RV nome de la Komitato. Kiel posteulo estas proponita AP. Ŝi atentigas pri pluraj konataj problemoj koncerne la nunajn ERM, kaj imagas renovigon de la Rendevuon. Ŝi proponas pli detale esplori tion kaj okazigi specifan kunvenon pri tio. AP kaj ŝia edzo Edmond pretus organizi por la venontaj ses jaroj.

Decido :

La Komitato konfidas al AP kaj ŝia edzo la organizon de la Eŭropa Rendevuo de la Federacio ekde la jaro 2010.

Poras : CB, MD, XD, JD, CLÉ, FG, AP, JR, FV, RV, XV (11)

Sindetenas : — (0)

Kontraŭas : — (0)

4. INTERFEDERACIA KONGRESO EN 2010

Informoj : XD memorigas la projekton iniciatitan de li kaj William Dumoulin, prezidanto de la Francilia Federacio. Ĝi konsistas el la organizo de komuna, interfederacia kongreso en printempo 2010 (marto aŭ aprilo) en Amiens (Pikardio). Yves Nicolas, prezidanto de la Normandia Federacio, diris sin tre favora al triopa komuna kongreso. La kongreso okazos dum dutaga semajnfino. La klubo Esperanto-80 pretas por kunorganizi tiun kongreson kun la Federacio. En la kongreso okazos la jarkunvenoj de la tri federacioj kaj ankaŭ kulturaj aŭ turismaĵoj.

Decido :

La Komitato aprobas tiujn kongresajn principojn, kaj instigas al plua antaŭeniro tiudirekten.

Poras : CB, MD, XD, JD, CLÉ, FG, AP, JR, FV, RV, XV (11)

Sindetenas : — (0)

Kontraŭas : — (0)

5. TOMBO DE ÉMILE GROSJEAN-MAUPIN

Informoj : JR informas, ke en Herculourt estas la tombo de la esperantisto Émile Grosjean-Maupin, kiu famiĝis kiel membro de la Akademio de Esperanto kaj kunverkinto de Esperanto-vortaroj. Lia tombo ruiniĝas. Lastatempe la urbodomo indikis, ke post tri jaroj da nezorgo de tiu tombo ĝi reprenos la koncesion kaj metos la ostojn en komunan fosajon. JR proponas, ke la Federacio zorgu pri redignigo de lia tombo, komunikante al la urbestro pri lia fameco. JR nun serĉas eventualajn idojn. Alternativo estas ne prizorgi la tombon kaj anstataŭe starigi lianoman steleon ĉe la komuna fosajo. XD proponas, ke tiun demandon la Komitato ekzameni en posta kunsido.

6. TUTLANDAJ, INTERASOCIAJ KLOPODOJ

Informoj : XD informas, ke landskale li klopodas por okazigi kunvenon de la interasocia komisiono por kunlaboro inter UFE kaj SAT-Amikaro. Li proponis al Dominique Siméone, prezidanto de SAT-Amikaro, kunvenon en la 26^a de oktobro aŭ la 2^a de novembro en Parizo, kaj li atendas lian respondon. Tiu komisiono devos pritrakti plurajn projektojn : komuna renkontiĝo en 2011 en Langvedoko-Rusiljono, tutlanda peticio, ktp. CLÉ akompanos en tiu komisiono. XD kaj CLÉ asertas, ke neeblos ion sukcesi, se tiu komisiono ne kunsidos plej malfrue la 2^{an} de novembro.

7. EVENTUALECO DE UNIVERSALA KONGRESO EN FRANCIO

Informoj : XD informas, ke pro manko de kandidatoj UEA antaŭnelonge sugestis al UFE organizi Universalan Kongreson en Francio en 2011 — kion XD rifuzis kiel landa prezidanto. Li memorigas, ke en 2005 la Federacio kun UFE kandidatis por akcepti la Universalan Kongreson en 2005 en Lille, sed tiam UEA rifuzis laŭ pretekstoj — tiam estiĝis la organizo de « Boulogne 2005 ». Pluraj esperantistoj (ĉefe eksterlandaj) instigis al UFE/XD baldaŭ organizi denove Universalan Kongreson pro la historieco kaj la kvalitoj de la franca movado. Tio ĉi firmigis XD'n proponi al la Federacio kandidati (unue landskale) por akcepti en 2015 en Lille la 100^{an} Universalan Kongreson. Li klarigas kelkajn organizajn principojn rilate la Universalajn Kongresojn. Tiu Universala Kongreso povus okazi en Lille Grand Palais kaj enkalkuli tuttagan ekskurson en Boulogne. La komitatoj rimarkigas, ke tiu propono estas ja interesa, kaj ke tia aranĝo donos celon kaj antaŭenemon al la movado. CLÉ indikas, ke li ne povos objektive voĉdoni pro tio, ke li ne povos mem partopreni la organizon.

Decido :

La Komitato aprobas la kandidatiĝon de la Federacio por akcepti la 100^{an} Universalan Kongreson de Esperanto en 2015 en la urbo Lille.

Poras : CB, MD, XD, JD, FG, AP, JR, FV, RV, XV (10)

Sindetenas : CLÉ (1)

Kontraŭas : — (0)

8. FEDERACIA PREZIDANTECO

Informoj : XD referencas al lia « vorto de la prezidanto » en la ĵusa numero de la federacia revuo *Norda Gazeto*, en kiu li diris sian intencon ekŝiĝi de la federacia prezidanteco pro sia tiama landa prezidanteco kaj la neebleco samtempe, dece plenumi ambaŭ oficojn. Intertempe li ekŝiĝis de la landa prezidanteco okaze de la septembra landa komitatkunsido. Sekve lia federacia situacio ŝanĝiĝis, kaj li nun intencas daŭrigi sian federacian prezidantecon almenaŭ ĝis la venontprintempa federacia kongreso, kiam estos elektitaj nova Komitato kaj nova Estraro. La komitatoj ja aprobas tiun pluan prezidantecon.

9. DIVERSAĴOJ : RENOVIGOTA KOMITATO DE LA KULTURA CENTRO GRÉSILLON

Informoj : CLÉ informas pri la nuna, malfacila situacio de la kultura centro Grésillon. Hodiaŭ ne plu estas komitato : novan komitaton oni nun provas konsistigi fine de 2009 – François Lo Jacomo nun alvokas al kandidatiĝoj. Okazis personaj konfliktoj, kaj necesas multegaj laboroj por ripari la kastelon kaj vivteni ĝin. Pluraj komitatoj estas skeptikaj pri la estonteco de Grésillon kaj la kapablo kaj oportuno konservi tiun kastelon, almenaŭ sen ĝisfundaj ŝanĝoj.

Ĉi tiun protokolon faris en la 20^a de oktobro 2009 :


XAVIER DEWIDHEM
Federacia Prezidanto